

VEDTÆGTER FOR KØBENHAVNS ESPERANTO-KLUB

§1. Navn og formål

- 1.1 Foreningens navn er ”Københavns Esperanto-Klub” (Konversacia Esperantista Klubo – KEK), stiftet 2. januar 1908.
- 1.2 Foreningens formål er, som en lokalafdeling af Esperanto-Foreningen for Danmark, at fremme kendskabet til og anvendelsen af esperanto i København og omegn, i første række gennem sikring af regelmæssig undervisning i sproget.
- 1.3 Foreningen som sådan er neutral med hensyn til nationalitet, race, religion og politik.
- 1.4 Foreningens arbejde bør så vidt muligt foregå som en integreret del af det lokale kulturliv og i samarbejde med andre ligesindede foreninger.

§2. Sprogbrug

- 2.1 Foreningen skal regelmæssigt afholde møder hvor esperanto bliver brugt. Foreningens bestyrelsesmøder og forhandlinger med andre esperantoforeninger foregår fortrinsvis på esperanto. Generalforsamlingen kan efter ønske fra flertallet af de tilstedeværende foregå på dansk.
- 2.2 Der tages beslutningsreferat på esperanto over bestyrelsens møder og generalforsamlingen. Der skal udarbejdes en dansk oversættelse af generalforsamlingens referat og af foreningens vedtægter.

§3. Medlemskab

- 3.1 Som medlem optages enhver, som interesserer sig for foreningens arbejde og anerkender dens vedtægter.
- 3.2 Æresmedlemmer kan udnævnes af en generalforsamling efter bestyrelsens indstilling.
- 3.3 Årskontingent fastsættes af generalforsamlingen.

- 3.4 Stemmeret til generalforsamlingen har hvert medlem, der har betalt kontingent senest 1 måned før.
- 3.5 Et medlem, der efter to ryktere ikke har betalt kontingent i 4 måneder, betragtes som udtrådt af foreningen.
- 3.6 Bestyrelsen kan, skriftligt og med fornøden begrundelse, udelukke et medlem, der åbenlyst modarbejder foreningens formål. Et udelukket medlem har ret til at klage over beslutningen på generalforsamlingen.

§4. Bestyrelse

- 4.1 Foreningen ledes af en bestyrelse, der består af en formand og mindst 4 andre medlemmer, og som konstituerer sig med næstformand, kasserer og sekretær.
- 4.2 Bestyrelsens medlemmer vælges af generalforsamlingen og kan genvælges. Formanden vælges særskilt for 1 år ad gangen, de øvrige bestyrelsesmedlemmer for 2 år, således at halvdelen af dem er på valg hvert år.
- 4.3 Ved valg af bestyrelsesmedlemmer vælges samtidig mindst 2 suppleanter for ét år ad gangen.
- 4.4 Kassereren udarbejder regnskabet. Regnskabsåret er kalenderåret.
- 4.5 Foreningens regnskaber revideres af 2 revisorer, der vælges af generalforsamlingen for 2 år ad gangen, således at 1 af dem er på valg hvert år. Ved revisorvalget vælges samtidig 1 suppleant.

§5. Tegningsregler

Køb, salg eller pantsætning af fast ejendom og optagelse af lån kan kun ske efter lovlig vedtagelse i bestyrelsen og med formandens og 2 andre bestyrelsesmedlemmers underskrift. I andre tilfælde forpligtes foreningen af formanden i forbindelse med et andet medlem af bestyrelsen.

§6. Generalforsamlingen

- 6.1 Generalforsamlingen er foreningens højeste myndighed. Den indkaldes af bestyrelsen med mindst 4 ugers varsel.
- 6.2 Forslag til generalforsamlingen skal være bestyrelsen i hænde senest 14 dage før generalforsamlingen.
- 6.3 Valg og beslutninger skal ske ved skriftlig afstemning, såfremt 1 medlem ønsker det.

- 6.4 Afgørelser træffes med simpelt flertal, undtagen forslag om vedtægtsændringer og om foreningens opløsning (§8 i disse vedtægter).

§7. Ordinær og ekstraordinær generalforsamling

- 7.1 Ordinær generalforsamling afholdes hvert år inden udløbet af marts måned. Dagsordenen skal mindst indeholde følgende punkter:
 1. Valg af dirigent
 2. Valg af referent
 3. Formandens beretning
 4. Regnskab
 5. Det fremtidige arbejde
 6. Forslag
 7. Kontingent
 8. Valg af formand
 9. Valg af øvrige bestyrelsesmedlemmer
 10. Valg af suppleanter
 11. Valg af revisorer og suppleanter.
 12. Eventuelt
- 7.2 Bestyrelsen kan til enhver tid indkalde til ekstraordinær generalforsamling, med angivelse af dagsorden.
- 7.3 Bestyrelsen skal indkalde til ekstraordinær generalforsamling senest 6 uger efter, at mindst 1/3 af medlemmerne har fremsat begæring herom over for formanden med angivelse af ønsket dagsorden.

§8. Vedtægtsændringer og foreningens opløsning

- 8.1 Ændring af disse vedtægter kan kun finde sted ved en generalforsamlingsbeslutning og kræver mindst 2/3 af de afgivne stemmer.
- 8.2 Foreningen kan kun opløses, når 2 på hinanden følgende generalforsamlinger beslutter det med mindst 2/3 af de afgivne stemmer. I tilfælde af opløsning tilfalder foreningens midler Esperanto-Foreningen for Danmark.

København NV, februar 2008

STATUTO DE KONVERSACIA ESPERANTO-KLUB

§1. Nomo kaj celo

- 1.1 La nomo de la societo estas “Konversacia Esperantista Klubo” (Københavns Esperanto-Klub – KEK), fondita la 2-an de januaro 1908.
- 1.2 La celo de la societo estas, kiel loka sekcio de Dana Esperanto-Asocio, progresigi la konatecon kaj la aplikadon de Esperanto en la regiono de Kopenhago, unuavice per certigo de regula instruado de la lingvo.
- 1.3 La societo kiel tia estas neŭtrala koncerne naciecon, rason, religion kaj politikon.
- 1.4 La laboro de la societo laŭeble okazu kiel integra parto de la loka kultura vivo kaj kunlabore kun aliaj similcelaj societoj.

§2. Lingvouzo

- 2.1 La societo devas regule okazigi kunvenojn kie Esperanto estas uzata. La estrarkunsidoj de la societo kaj traktadoj kun aliaj Esperanto-societoj okazas prefere en Esperanto. La Ĝenerala Kunveno laŭ deziro de la plimulto de la ĉeestantoj povas okazi en la dana lingvo.
- 2.2 La decidoj de la estraro kaj de la Ĝenerala Kunveno estas protokolataj en Esperanto. La protokolo de la Ĝenerala Kunveno kaj la statuto de la societo devas troviĝi en danlingva traduko.

§3. Membreco

- 3.1 Membro de la societo povas fariĝi ĉiu persono, kiu interesiĝas pri la laboro de la societo kaj agnoskas ĝian statuton.
- 3.2 Honoraj membroj estas nomumebaj de la Ĝenerala Kunveno laŭ rekomendo de la estraro.
- 3.3 Jarkotizon fiksas la Ĝenerala Kunveno.
- 3.4 Voĉdonrajton en la Ĝenerala Kunveno havas ĉiu membro, kiu pagis kotizon minimume 1 monaton antaŭe.

- 3.5 Membro, kiu post du pagpostuloj ne pagis kotizon dum 4 monatoj, estas rigardata kiel ekŝiginta el la societo.
- 3.6 La estraro povas, skribe kaj kun necesa motivigo, eksigi membron kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de la societo. Eksigita membro havas la rajton plendi pri la decido al la Ĝenerala Kunveno.

§4. Estraro

- 4.1 La societon gvidas estraro, kiu konsistas el prezidanto kaj minimume 4 pliaj membroj, kaj kiu dividas inter si la oficojn de vicprezidanto, kasisto kaj sekretario.
- 4.2 La membroj de la estraro estas elektataj de la Ĝenerala Kunveno kaj estas reelekteblaj. La prezidanto estas aparte elektata por 1 jaro, la ceteraj estraranoj por 2 jaroj, tiel ke ĉiujare duono el ili estas elektataj.
- 4.3 Ĉe la elekto de estraranoj estas samtempe elektataj minimume 2 anstataŭantoj, kiuj funkcias dum 1 jaro.
- 4.4 La kasisto ellaboras la kalkulaĵon. La administra jaro estas la kalendara jaro.
- 4.5 La kalkulaĵon de la societo revizias 2 revizoroj, elektataj de la Ĝenerala Kunveno kaj funkciantaj dum 2 jaroj, tiel ke ĉiujare 1 el ili estas elektata. Ĉe la elekto de revizoroj estas samtempe elektata 1 anstataŭanto.

§5. Subskribreguloj

Aĉeto, vendo aŭ lombardo de domo kaj alpreno de pruntoj povas okazi nur post laŭstatuta decido en la estraro kaj kun la subskribo de la prezidanto kaj de du pliaj estraranoj. Aliokaze la asocio estas devontigata de la prezidanto lige kun alia membro de la estraro.

§6. La Ĝenerala Kunveno

- 6.1 La Ĝenerala Kunveno estas la plej alta instanco de la societo. Ĝi estas kunvokata de la estraro kun antaŭaverto de minimume 4 semajnoj.
- 6.2 Proponoj al la Ĝenerala Kunveno devas esti skribe prezentitaj al la estraro minimume 14 tagojn antaŭ la Ĝenerala Kunveno.

- 6.3 Elektaj decidoj devas okazi per skriba voĉdono, se 1 membro tiel deziras.
- 6.4 Decidoj estas farataj per simpla voĉ-plimulto, escepte de statutsanĝoj kaj dissolvo de la asocio (§8 de ĉi tiu statuto).

§7. Ordinara kaj eksterordinara Ĝenerala Kunveno

- 7.1 La ordinara Ĝenerala Kunveno okazas ĉiujare antaŭ la fino de marto. La tagordo devas enhavi almenaŭ la jenajn punktojn:
 1. Elekto de kunvenvidanto
 2. Elekto de protokolanto
 3. Raporto de la prezidanto
 4. Kalkulaĵo
 5. Proponoj
 6. La estonta laboro
 7. Kotizo
 8. Elekto de prezidanto
 9. Elekto de ceteraj estraranoj
 10. Elekto de anstataŭantoj
 11. Elekto de revizoro kaj anstataŭanto
 12. Eventualaĵoj
- 7.2 La estraro povas ĉiam ajn kunvoki eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, indikante tagordon.
- 7.3 La estraro devas kunvoki eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon okazantan plej malfrue 6 semajnoj post kiam minimume 1/3 de la membroj prezentas postulon de tio al la prezidanto, indikante la deziratan tagordon.

§8. Ŝanĝo de la statuto kaj dissolvo de la societo

- 8.1 Ŝanĝo de ĉi tiu statuto povas okazi sole per decido de la Ĝenerala Kunveno kaj bezonas minimume 2/3 el la donitaj voĉoj.
- 8.2 La societo povas esti dissolvita nur kiam du sinsekvaj Ĝeneralaj Kunvenoj tion decidis per minimume 2/3 el la donitaj voĉoj. Okaze de dissolvo la posedaĵoj de la societo transiras al Dana Esperanto-Asocio.